



AMERIKA ESPERANTISTO

E



M. PLATTNER

Sept.-Oct., 1923

	Page
Nia XVa Universala Kongreso	Edmond Privat
Notes and News from the Central Office	1
Niaj Pioniroj	E. J. Meriam
Nuremberg 1923	6
Fate—Destino	H. I. Keyes
Parolado de Privat je la XVa Universala Kongreso	7
Manifesto al la Mondo	Mary Spalding—C. F. Bardorf
Learn—Use—Spread Esperanto	9
An Impression of the Nuremberg Congress	10
Nokturno	12
Jan Zizka, Komandanto de Husitoj	13
Latinamerika Fako	14
Recenzoj	Adelia B. Frost
La Legendo pri la Postlasajo de la Maŭro	15
	D. W. M. Jenkins
	D. W. M. Jenkins
	Dr. Louis Allen
	16
	19
	20
	23

AMERIKA ESPERANTISTO

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo.—L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

Esperanto Association of California, Inc.—Meets first Tuesday evenings, Rooms 309-311 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secretary, 1160 Fell Street.

MONTRÉAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association.—Meets each Monday evening at 8 in Room 12, The Tooke Bldg. Sec., Miss E. Strachan.

TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Club.—Meets every Thursday at 8.30 P.M., at the Friend's Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec., A. P. H. Rollason, Box 123, Terminal A, Toronto.

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanto Klubo.—Meets every Wednesday, at 8 P. M., during June and September, and between, at Apartment 53, No. 706 Eleventh St., N. W.

Kolumbia Esperanto Asocio.—No meetings during June and September, and between. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ciumonate.

ROCKFORD, ILLS.

Scandinavian Esperanto Institute, 1217 7th Ave.

BOSTON, MASS.

Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. M. Marootian, Secretary.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

BALTIMORE, MD.

La Baltimore, Md., Esperanta Rondeto meets 1st and 3rd Wednesday evenings in month at Md. Academy of Sciences.

PORRTLAND, ME.

Portland Esperanto Society.—Mrs. E. C. Flint, Secretary, 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 607 Breitmeyer Bldg.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M.-9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.15 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

Group Charter—\$1.00.

TOPEKA, KANSAS Esperanto Association. Prez. Capt. Geo. P. Morehouse. Sek-iino, S-ino Lida R. Hardy, 1731 Lane St. Kores-Sek-lino, F-ino Leone Newell, 635 Watson St.

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the first Saturday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.

La dimanča kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

WEEHAWKEN, N. J.

Hudson County Esperanto Society, Box 32, Weehawken, N. J. Headquarters: Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J. Meetings: The second Tuesday of month. Secretary: Mr. O'Brien, 6 Hageman Place, West New York, N. J. Literatura Klaso, under direction of J. J. Sussmuth, every Tuesday except second, Room 307 Dispatch Building, Union Hill, N. J.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo.—S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

OKLAHOMA CITY, OKLA.

La Oklahoma City Esperantista Societo kunvenas dimanče. R. E. Dooley, instruisto, 527 North Durand. Ni alte estimus korespondadon pri metodoj de propagando, klasorganizo, kaj studado. C.R.D.S. Oakford, prez., H. Barton, sek.

ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College eldonas ½-jaran jurnalon, "La Studento," jara abono \$1.00.

PHILADELPHIA, PA.

Philadelphia Esperanto Society, Henry W. Hetzel, Sec'y, West Phila. High School for Boys. Barco and monthly meetings on third Tuesdays at Hotel Hanover, 12th and Arch Sts. (Barco 6.45; business meeting 7.45 P.M.) Centra Loka Oficejo, 133 N. 13th St. (Librovendejo de Peter Reilly, Vic-Delegito de U. E. A.)

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanto Stelo de Polujo.—Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 509 N. York Ave.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

Amerika Esperantisto

ORGANO
de la
ESPERANTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO
507 Pierce Bldg., Copley Square
Boston 17, Mass., U. S. A.

Vol. 32.

Sept-Okt., 1923

No. 3.

Nia XVa Universala Kongreso

Kvinmil esperantistoj el 43 landoj kunvenis en aŭgusto en Nurnberg kaj nia XVa kongreso estis tiel vastnombra, ke la konatuloj perdiĝis en amaso. Plej bonajn amikojn oni renkontis okaze la unuan fojon jam la lastan tagon antaŭ forveturo. Pri kongreso ne taŭgas plu paroli, sed pri vera popolamaso esperantista. Cetere, post la malfermo, nur milo da kongresanoj sekvis la laborkunsidojn.

Provizi hotelojn, poštton, ekskursojn, festojn ktp, por tiom da personoj en la nuna kriza stato de Germana Respubliko estis ja malfacila tasko. Multe laboris kaj sindone klopojis la loka komitato, sed okazis diversaj maloportunajoj de materiala vidpunkto, kiujn oni devos eviti estonte.

Kontraŭe, morale la kongreso kreis bonan atmosferon, Bonhumoro regis kaj la mirinda urbo kun mezaĝaj muroj kaj turaj dompintoj lasis al ĉiuj neforgeseblan impreson. La ĝojon tamen malheligis la mizera situacio de la neriĉaj klasoj en la lando kaj la bedaŭrinda deviga foresto de niaj francaj kaj belgaj amikoj.

Ciufoje kiam oni mencias ilin, aplaŭdis la kongreso kaj niaj germanaj samideanoj sincere serĉis ĉiun okazon por publike kaj kurage esprimi sian koran senton al ili. Inter la akraj afišoj sur la muroj kaj la frata internacia atmosfero de l' esperantistaro, la kontrasto aperis vere grandega kaj honoriga al nia movado.

La XVa kongreso estis la unua, kie la organiza demando ne staris plu sur la tagordo. Tio signis ja komencon de pli bona epoko. La Konstanta Reprezentaro de Naciaj Societoj (K. R.) kunsidis kaj elektis sian estraron. Ni deziras al la nova prezidanto S-ro Merchant kaj al lia kunlaboranto S-ro Edmonds plej bonan sukceson en ilia konstrua laboro. Niaj naciaj societoj multe gajnos kune diskutante komunajn spertojn pri propagando

kaj lernante unu el aliaj. K. R. kaj UEA elektis interkonsente la novan Centran Komitaton de nia movado, kies ses anoj dediĉos tutan sian liberan tempon kaj forton al la antaŭenpuŝo de nia tutmonda propagando. S-ro Page zorgos pri financoj kaj klopodos trovi monon por subteni niajn oficialajn instituciojn kaj la necesan eksteran agadon. S-ro Hromada organizos internacian gazetservon. D-ro Dietterle kolektos statistikojn kaj atentos pri la tuta instrua flanko de nia movado. S-ro Chavet daŭrigos sian internan laboran de kunigado kaj konstantigo de niaj organizacioj. S-ro Kenn, nia fervora ĉina pioniro, nun en Eŭropo, reprezentos la dezirojn kaj bezonojn de la kreskanta esperantistaro el ceteraj kontinentoj.

Oni volis meti sur miajn ŝultrojn la pezan respondecon prezidi tiun C. K. kaj gvidi la ĝeneralan internacian propagandon anstataŭ permesi, ke mi revenu nun al frankvileco kaj literatura verkado. Koran dankon pro la fido. Ni ĉiuj daŭros fari nian eblon, sed la ĉefa laborado estas en viaj ĉies manoj. Nur per via pacienca ĉiutaga kunhelpado ni atingos ion!

Laŭ la deziresprimo de la XVa, la XVIa kongreso devos okazi en Sofia, la bulgara ĉefurbo, por konigi nian aferon en tute alian parton de Eŭropo ol ĝis nun. Oni atendas ankoraŭ ĉu la registaro estas preta inviti oficiale kaj garantii la necesan protektadon. Ankaŭ en Vieno okazos tre grava afero, pri kiu ni reparolos. Intertempe estas urĝe, ke teknika konferenco kaj kunsido de K. R. okazu dum vintro aŭ printempo en Parizo aŭ Bruselo por ke ankaŭ la Okcidento aŭdu pri niaj progresoj.

Do brave antaŭen. La afero marĝas. Dankon al niaj amikoj en Nurnberg pro ilia kurago.

E. P.

THE
“EDINBURGH”
 Esperanto Pocket Dictionary

Esp.-Eng. & Eng.-Esp.

Cloth Binding \$0.75 Leather \$1.75

On sale at Esperanto Office or at leading Booksellers.

New York

T. Nelson & Sons, Ltd.,

Toronto

Notes and News from the Central Office

An attractive little folder announcing "The Esperanto Book Shelf" of the Free Public Library of Topeka, Kansas, established last March by the Topeka Esperanto Association gives a list which would go far towards filling President Eliot's much quoted five-foot-shelf.

Mr. and Mrs. Donald E. Parrish of Buffalo have sent out an "Esperanto Class Announcement" for the season of 1923-1924, the first class to be organized Friday October 5th.

Mr. Howard B. Frost of Riverside, Calif. has written for material (ammunition) to use when he presents a paper before the Western Society of Naturalists at Los Angeles (Sept. 17-19) on the "International Auxiliary Language, present status and prospective value to Science." We hope to have a report of the interest shown in Esperanto as a result of this paper.

Prof. Wm. J. H. Knappe, of Wartburg College, Clinton, Iowa, has aroused interest in Esperanto among "Amikoj kaj Konatuloj" during his summer wanderings. Already the seed has begun to bear fruit in inquiries and book orders.

Mr. Robert I. Clegg, of 225 North Michigan Avenue, Chicago, a member of our Executive Committee, is the American delegate elected by the Esperanto League of Free Masons during the Nuremberg Congress. Among the special features of the Congress was the performance of Lessing's Masonic play "Nathan la Saûlo."

Mr. Herbert M. Scott, for many years co-editor of Amerika Esperantisto, has been appointed Fakestro por Filatelio of the Technical Section of the Lingva Komitato.

Dr. J. J. Link, 2102 So. Grand Avenue, St. Louis, Mo., is among the Kunlaborantaro of the Tutmonda Esperantista Ku-racista Asocio (T. E. K. A.) whose organ is the Internacia Medicina Revuo, as well as Dr. J. VanBecelaere, 2103 Pacific Ave., San Francisco, Calif., (formerly of San Diego).

Personal messages have come from Miss Stoeppler and Mr. Stephens, our delegates to the Nuremberg Congress, reporting it as a great success.

Extra copies of the July-August Congress number of Amerika Esperantisto are available at 10c each (a double number). Reprints have been made on heavy paper of "Congressional Vignettes" which are on sale at 5c each; they are much clearer than the copy in the Magazine.

The first issue of The Golden Age (*Ora Epoko*) Esperantist edited by our *tre vigla samideano* James D. Sayers has appeared, with the special mission of bringing *nia kara lingvo* before the International Bible Students Association, that great world-chain of those who see the "Old World Dying," and the "New World Beginning" in their study of the scriptures.

Dr. F. G. Cottrell, Chairman of the Committee on International Auxiliary Language of the International Research Council, Washington, has just sent out his "Report of Progress." With it comes the "Memorial" of the International Language Association (United States Branch) General Advisory Committee, which was formed after the meetings arranged for in March by Mrs. Dave H. Morris in New York. It gives the aims of the Branch and the list of Advisory Committee, with the opportunity for signatures of those who endorse its purposes. Copies of same may be had by addressing Herbert N. Shenton, Secretary, Department of Sociology, Columbia University, New York City.

Persons who are making trips or going to new homes in Usono frequently write to the Central Office to know about Esperantists in the towns or cities to which they journey. This is gladly given, but a really dependable list is very limited due to the many unusual changes which have come in the past ten years. A new Adresaro is being started this fall arranged according to states and towns; please send in the names and addresses of Esperantists you know who may not at present be connected with any class or the National Society, wherever they may be.

Clippings from newspapers that come to the Central Office from time to time are of great value; do not be afraid that a small notice is not worth while, it may help make a contact. If you see something that needs an answer in a local paper do not hesitate to reply: editors are always willing to take news,—but send us copies of both. Not long ago a reply came to the attention of an editor which decided him to publish articles in Esperanto in his own paper. The question of some sort of a common means of communication is in the air, and Esperanto is ready to answer that query. Are you doing your part?

Hardly a Tuesday evening passes, especially during the summer, when the Boston Society does not have the pleasure of greeting a well known samideano, making the acquaintance of a sojourner in the city, or helping the stranger in a strange land. One evening in August brought Miss Daisy Flanders of Manchester; another evening a young man from Florida on his way to a New England College, an old friend bringing an *interesulo*

who wishes to join the class in the fall, and a man from Sweden looking for a teacher of English among his own race. The latter, especially, makes glad the heart of President Lee, who has always felt that an Esperanto group is logically a language headquarters.

The fifth Saturday Barço of the Boston Esperanto Society occurred on Saturday September 29th, at the Pierce Building, 6.30 P. M., where a cordial welcome was waiting for all as well as a bountiful supper.

The Boston Esperanto Society with the rest of Esperantujo extends its sympathy to the family of Colonel John Pollen, whose joyous presence at a meeting during his visit to America in 1910 will long be remembered. His signed photograph, a memento of his visit, hangs on the wall in the group of Eminenculoj.

Owing to the lateness of this issue we are combining the September and October numbers and increasing the number of pages. The November number will also be of increased size, thus offsetting the omitted issues as to volume of matter.



S-ino A. Wicks

Niaj Pioniroj

de

H. I. Keyes

Honoron al ili—la homoj fidelaj
 Kun koroj plenegaj de arda espero!
 Honoron! Iliaj klopodoj altcelaj
 Informis la mondon pri Nia Afero.

Honoron al ili—la propagandistoj
 Senlace agemaj en homa helpado;
 Ja ili—agantoj kaj idealistoj—
 Alportis bonfamon al nia movado.

Honoru, honoru la homojn fervorajn!
 Ju pli ili kontraŭstaradon eltrovis
 Des pli ili faris atakojn tutkorajn—
 Des pli ili sian kuraĝon elprovis.

Senĉese, sendanke la pioniraro
 Celante mondvestan, tuthoman konsenton
 Al lingvo neŭtrala, per vorto kaj faro
 Konstante altiris tutmondan atenton.

Vi, homoj de tiu ĉi generacio,
 Heredas la kampon de ili plugitan;
 Gesamideanoj! Memoru pri tio!—
 Rikoltu la grenon de ili semitan!

Atingu la celon de ili viditan
 En songo profeta pri tempo estonta;
 Plenumu la taskon por vi difinitan
 Aŭ forĝu armilojn por venko venonta!

Antaŭen! antaŭen! ho miaj gefratoj!
 La verda standardo jen en la aero!
 Ni pace militas—vi estas soldatoj;
 Antaŭen! batalu por Nia Afero!

Nuremberg 1923

The Fifteenth Universal Congress of Esperanto, held this year in Nuremberg, Germany, has come and gone. It the biggest manifestation of Esperantist solidarity which has yet been witnessed. Five thousand **samideanoj** from 42 countries took part. The quaint old city, so well described in Longfellow's poem, for the time being seemed to become a town in which Esperanto was an indigenous language. Every other person one met on the street wore the Congress badge, and it came almost like a shock to find at the railway station, in the shops, or in the hotels one had to fall back on German—or English.

It was a great human carnival of good will. For the time being national animosities were forgotten, and one tried to realize that the golden age had arrived. But alas! the vagaries of the exchange worked sad havoc with one's ideals. We became gradually aware that we were living among an impoverished people, victims of the bloodiest war in history, while those of us from **bonvalutaj landoj** who experienced a rise in the pound sterling in one week from three millions of marks to twenty-two millions found ourselves in an extraordinary position of affluence. The conditions were such that many of the German members were unable to remain to the end as their resources had become exhausted.

One impression of the Congress remains on the mind, an impression which gives rise to great hopes for the future of Esperanto—the great proportion of young men and women who were present. The future lies with them, and though many of them seemed more devoted to the pleasure side of the Congress, many of the more thoughtful gave evidences of their intention to use Esperanto for practical purposes. Who can tell what use the university students will make of Esperanto when they come to the fruition of their powers?

In a huge congress like the fifteenth real business became difficult. The large hall in which the congress meetings were held was too spacious as a debating hall, and many of the speakers were indistinctly heard. Reports were given in from the various official organizations and adopted, and great satisfaction was expressed that the organization question which had burdened the Congress programs for many years was at last settled.

Last year at Helsingfors an agreement was reached by which Universala Esperanto-Asocio as an organization of individuals became an official institution, and arrangements were made for founding an organization of the national Esperanto societies (*Konstanta Reprezentantaro*) both of which bodies were to agree on the election of a Centra Komitato consisting of six

members. In the meantime the Konstanta Reprezentantaro has been organized and at its meeting at Nuremberg elected Mr. John Merchant, Sheffield, as its first president. It also in conjunction with U. E. A. elected the Centra Komitato as follows:—

Hon. President, General Sebert, Paris.

President, D-ro Edmond Privat, (Department of General Propaganda).

S-ro Gabriel Chavet, Paris (Internal Affairs).

D-ro John Dietterle, Leipzig, (Educational and Literature).

S-ro R. Hromada, Prague, (Public Information).

S-ro Kenn, Lyon, (America and the East).

S-ro W. M. Page, Edinburgh (Finance and Law).

The K. K. K. (Konstanta Kongresa Komitato) appointed by the C. K. has for its president S-ro J. M. Warden, Edinburgh.

The only other official institution besides U. E. A. is the Lingva Komitato kaj Akademio, the president of which is Prof. Th. Cart, Paris. It is independent and supreme in all language questions.

The interesting feature of the new organization is the provision for representing American and Eastern interests in the Centra Komitato. S-ro Kenn is particularly competent to do this, as he is a young Chinaman who has travelled much and has already done a great deal for the propaganda of Esperanto in his native country.

The financial interests of the official institutions have been committed to the hands of a Britisher because of the unstable economic conditions on the European continent. It was pointed out at the Congress that it is very important in order to give the new organization a good start that a good capital sum should be placed at its disposal, and a special appeal was made to Esperantists in bonvalutaj landoj to contribute substantial sums to the Centra Kaso. It is hoped that Americans will help as far as they can. It has to be kept in mind that the Esperantist workers are as a rule comparatively poor. There are many sympathisers who are in affluent circumstances whose support at this stage will be of great value. There is now a fine opportunity for a munificent donor, who could by a noble gift earn the gratitude of thousands of men in all countries, and help forward one of the greatest modern movements for the advancement of the highest interests of humanity.

Fate

By Mary Spalding

Two shall be born the whole wide world apart,
 And speak in different tongues, and have no thought
 Each of the other's being, and no heed:
 And these o'er unknown seas, to unknown lands
 Shall cross, escaping wreck, defying death:
 And all unconsciously shape every act,
 And bend each wandering step to this one end,
 That one day out of darkness they shall meet
 And read life's meaning in each other's eyes

And two shall walk some narrow way of life,
 So nearly side by side, that should one turn,
 Ever so little space to left or right,
 They needs must stand acknowledged face to face;
 And yet with wistful eyes that never meet,
 And groping hands that never clasp, and lips
 Calling in vain to ears that never hear,
 They seek each other all their weary days,
 And die unsatisfied.—And this is Fate.

Destino

de Mary Spalding

En la mondon dise du naskiĝos
 Malsimilajn lingvojn parolontaj,
 Kaj ne havos person, zorgon unu
 Pri alia. Ŝiperreo spite
 Marvojaĝoj fortimiĝos; morto
 Estos fortената, kvazaŭ moke,
 Por ke ĉiu pašo gvidu ilin
 Renkontiĝe el malluma vojo
 Kaj al kono de la viva signifo.

Kaj vagados du laŭ vojo eta,
 Tiel proksimege paſos ili
 Ke per nura, sola deflankiĝo
 Ili nepre starus renkontiĝe.
 Sed okuloj serĉos vane, manoj
 Senutile manojn palpe serĉos,
 Lipoj, al oreloj ne aŭdantaj,
 Vokos ĝis la tago malespera
 Alvenigos morton.—Jen Destinon.

Tradukis C. F. Bardorf.

Parolado de Privat je la XVa Universala Kongreso

En plena atento de la ĉeestantaro, Dr-ro Privat, la tradicia ora toro de niaj kongresoj prenas la parolon. En la nomo de Universala Esperanto-Asocio, la granda familio esperantista, li salutas la kunvenintojn el ĉiuj mondpartoj. Li estas felice troviĝi en Nurnberg, urbo de tiom da revoj. Kiel infano ĝojanta pri la Nurnbergaj ludiloj, kiel studento aŭskultanta la rakontojn pri la glora tempo pasinta kaj atestata hodiaŭ de ĉarmaj turoj, fortikaj muroj, pintaj domoj, kiel esperantisto memoranta pri la unuaj pioniroj, unuaj libroj, unua gazeto, lin ravis la samaj revoj.

Ne ekzistas esperantisto nescianta, ke tie ĉi vivis niaj unuaj pioniroj, kiuj tute solaj, kelkdekoj, prilaboris la malfacilan komencon, fidele kaj ame tenis la standardon, kuraĝigis kaj helpis la majstron. Kian plezuron ili nun havus vidante tiun imponan kongreson en sia urbo. Dank' al vi ĉiuj ni alportis al la tombo de la Nurnbergaj pioniroj la plej indan kronon per la rezultoj de nia ĝisnuna laboro. Nia afero ne plu estas karesata infano, ĝi jam fortigis, venke kontraŭbatalis uraganojn kaj fariĝis jam granda helpo spirita kaj teknika por la tuta homaro. Antaŭ dudek jaroj, kiam eniris nian movadon nia memorinda Hodler, ni pene devis batali por la unuaj rezultoj, kiuj nun venas abunde.

En tiuj tempoj ni havis grandan trezoron en la persono de la Majstro kun ni laboranta, nin inspiranta. Li ne plu estas interni kaj ni ne plu povas premi lian manon, sed lia memoro kaj inspiro restis inter ni. Dum la kanto de la himno ni ĉiuj sentis, ke lia spirito estas kaj agas tie. Venturante per aeroplano, ni ne plu vidas la surterajn bagatelojn, detalajn formikojn; ĉio sub ni aperas kiel unu sama pejzaĝo, sama naturo, samaj homoj kune aspektantaj, same ĝojantaj, same suferantaj. La spirito de Zamenhof estu por ni tia aeroplano nin forportanta de la ĉutagaj detaloj kaj tedajoj al sfero de pli vasta kaj alta kompremo. Filozofema, li tamen sciis kunigi la idealon kun la praktiko kaj nin instruante li donis al ni ankaŭ rimedon por efektivigi.

Oficiale, per la Bulonja Deklaracio nia movado estas ja nur teknika movado por disvastiĝi mondilingvon uzeblan de ĉiu por ĉiuj celoj. Tial estas pravaj ĉiuj fakaj societoj esperantistaj, kiuj malkaše kaj sincere anoncas sian apartan celon aŭ intereson. Sed la demando estas: ĉu tiom da homoj donus vivon, tempon, forton, monon, sanon por nia afero nur por faciligi la komercon aŭ la vojaĝojn aŭ eĉ la rilatojn inter sciencistoj? Ne, Esperantismo neniam vekus tiom da sindonoj se ne ekzistus pli profunda motivo en niaj koroj. Tiu kaŭzo de laboro estas la interna ideo, la espero entenata en la verko de Zamenhof.

Se nia movado ĝin perdus, kaj ni restus sole kun la bataloj de la cetera mondo tradukitaj en nia lingvo: klaso kontraŭ klaso, eklezio kontraŭ eklezio, nacia propagando kontraŭ alia nacia kontraŭpropagando, ĉu ni estas tiel fortaj, tiel unuigitaj? Ne, tio, kio nin kunligas estas ne nur la lingvo, sed la alta espero kiun ĝi simbolas. La interna ideo estas motivo kaj inspiro al laboro. Ni laboru fake kaj teknike per konferencoj, per vortaroj, per propagando, sed unu fojon en la jaro, laŭ la esprimo de la Majstro ni kunpilgrimas por festi la internan ideon de Esperanto.

Kio ĝi estas, ja tiu interna ideo? Ĉu ĝi estas ia sistemo, ia partio? Ne, ĝi neniel pretendas solvi aŭ eĉ tuŝi la nunajn sociajn aŭ naciajn problemojn kiuj bataligas homojn. Ĝi rilatas nur al la estonta tempo, kiam la vivo de l' homaro estos pli normala, ĝi estas kutimiĝo al frata kaj pac-a vivado inter diversaj kaj diversreligiaj homoj. Ĝi estas preparado kaj kutimiĝado al normaleco de interhomaj rilatoj. Ĝi estas apliko de moralaj leĝoj al tutmonda vivo, triumfigo de solidareco super egoismo en ĉiuj rilatoj, ĉu individua, ĉu kolektiva. Fine ĝi ankaŭ entenas sian poeziecon kaj donas al nia lingvo ĝian apartan vivan karakteron, malsaman de la naciaj lingvoj, kun specia tradicio.

Kion faros gejunuloj el sia vivo? Ĉu ili ĝin uzos por riĉigi aŭ batali? Ĉu ne pli noble ĝin dediĉi al tia granda konstrua movado? En la nigraj tempoj de l' homaro Esperanto fidele vigligas fajron sur la monto por ĝojigi la koron de la lacaj vojaĝantoj en malproksimo. (Longaj aplaŭdoj).



S-ino Wicks and Victoria Grupo

TAXATION OF LAND VALUES CONFERENCE ISSUES MANIFESTO IN ESPERANTO
INTERNACIA KONFERENCO PRI IMPOSTADO LAŬ TERVALORO, EN OXFORD, ANGLUJO,
13-20 AŬGUSTO, 1923
(Kie Dek Kvar Landoj Reprezentigis.)

MANIFESTO AL LA MONDO

Unuanime aprobita de la Internacia Konferenco pri Imposto laŭ Tervaloro, okazinta en Oxford, Anglujo, 13-20 Augusto, 1923.

Al Regantoj ĉiulande—SALUTON.

Ni, disciploj de Henry George, el dek kvar nacioj, dum Internacia Konferenco en Oxford, Anglujo, kunvokite de la Unuigita Komitato por Imposto laŭ Tervaloro, sendas ĉi tiun mesaĝon kaj vokon al ĉiu respondi por la regado de la nacioj.

La milito por fini militon finiĝis per paco, kiu finis pacon. Oni bezonas novan ŝtatpolitikon, kiu celas la liberecon de la popolo, kaj kies metodo estas la Justo; kaj tian ni ĉi tie proponas, sciante, ke ĝiaj pretenoj estas neneigeblaj de vidpunkto politika, komerca, ekonomia, aŭ justeca.

Ni kredas, kiel memevidantan veron, ke la sistemo de tesposedo estas en ĉiu lando la ĉefa faktoro en la vivo de ĝia popolo.

Klare, la nejusta malegaleco de havo, la persista depremiteco de komerco kaj industrio, kaj la daŭro de malriĉeco kun la malvirteto, krimo kaj mizerio kiujn ĝi naskas, rezultas el la privata monopolio de la tero, la privata konfisko de terpago, kaj la malkonfeso de la popola rajto al la tero de sia lando.

Klare, ju pli prema estas tiu termonopolio, des pli malalta estas la pago por ĉia laboro kaj la profito el komerco, industrio, kaj ŝparado, kaj des pli malriĉa la ekonomia, socia kaj spirita stato de la popolo.

Klare ĉi tiu estas demando tutmonda, ne nur loka aŭ nacia. Kiom gravas por germano aŭ franco, li estu laboristo aŭ aferisto, ĉu la monoplistoj, kiuj konsumas liakoste la enorman ekonomian renton de la Ruhr minejoj loĝas en Francujo aŭ en Germanujo!

Klare, la malbonojn, kiuj en la nacio naskas konstantan civilan luktadon, kaj internacie militon, por gajni pli da tero, aŭ de monopolio de tervaloroj, oni povas fini nur forigante le privatan termonopolon kaj la nejustan impostadon, kiuj nun ekzistas pro tio, ke de la popolo estas prirabita ĝia komuna rajto al la Patrolando.

Por tion efektivigi, ni insiste rekomendas, ke ĉies egalan rajton al la tero oni konfesu jenmaniere: oni kolektu por la publika enspezo la ekonomian renton de la tero per rekta impuesto laŭ tervaloro, kaj ĉiun alian imposton forigu; anstataŭigante la komerc-đetruan kaj milit-naskan tarifaron internacian per tiu absoluta Libereco de Komerco, kiu estas la natura rajto de ĉiu homo.

Ni avertas vin, ke tio devas fariĝi, kaj rapide, por fini la ĉiam-kreskan malkontenton kaj por malhelpi sangan revolucion, la disfalon de

civil'zacio, kaj la forigon de regantoj sen scio au kuraĝo agi antaŭ ol estos tro malfrue; ĉar la popola koro en ĉiu nacio estas plena de maldolĉo pro suferado, pro trošarĝo imposta, kaj pro tio, ke la popoloj kaj iliaj infanoj estas forbaritaj el la tero, kiu naskrajte apartenas al ili.

Hon. Prezidanto:

Sekretarioj:

Kunvokintoj de la Konferenco:

LA UNUIGITA KOMITATO POR IMPOSTO LAU TERVALORO,
11, Tothill Street, Londono, S. W. 1
(kien oni adresu ĉian korespondajon).

Learn--Use--Spread Esperanto

Learn Esperanto. No one can be truly an Esperantist who does not know the language. Esperanto is a beautiful language. It has few rules and no exceptions. Quite young children learn it easily. We suggest that you learn it in your vacation.

There could be no more enjoyable occupation for the less strenuous hours of your holiday than learning Esperanto.

Use Esperanto. The next step is to use it. Don't let a day go by without reading some Esperanto, if only for a few minutes. Write a letter in Esperanto now and then. It is easy to find an Esperanto correspondent. Above all learn to speak Esperanto. Like every other thing worth doing this takes time and practice to do well. But it will give pleasure out of all proportion to the trouble expended.

Spread Esperanto. It is potentially the mother-tongue of humanity. Think of the labours, poverty and struggles of Zamenhof and his earliest followers. "All for love and nothing for reward" they toiled and suffered to give Esperanto to the world. A solemn obligation rests upon Esperantists to spread the knowledge of Esperanto. We owe it to the memory of these noble men and the future of humanity.

You can get a complete grammar of Esperanto which you can slip into your pocket also the indispensable "Edinburgh Pocket Dictionary" and all information about Esperanto—the second language for all, from The Secretary, Esperanto Association of North America, 507 Pierce Bldg., Copley Square, Boston 17, Mass., U. S. A.

Karolino.—Donaldo diras ke li tre min amas, kvankam estas dum nur kvar tagoj ke ni estas konatiĝantaj.

Katarino.—Eble, mia kara, tio estas la kialo.

An Impression of the Nuremberg Congress

A letter to an Annapolis Esperantist gives an interesting account of the recent Congress of Esperantist in Nuremberg, Germany. Extract from the letter follows:

(Translation made for the Evening Capital.)

"Stuttgart, Aug. 19, 1923.

"Esteemed Fellow-thinker:

"On the way to the Congress I sat next to a young lady school-teacher of Milan, Italy, who knew not a word of German, but for four hours we talked in nothing but Esperanto and understood each other easily.

"Wednesday, August 1, was 'Reception Evening.' This was held in the large auditorium of the Congress Hall, accompanied by a splendid concert. Many seized the opportunity of getting acquainted. The widow of our Master—Dr. Zamenhof—had arrived promptly. As she entered the hall the orchestra immediately began to play and the entire assembly arose and joined in singing the Esperanto hymn. I assure you the impressions of that moment were most thrilling and never-to-be-forgotten.

"Thursday, August 2, 11 a. m., the convention opened for business. Five thousand persons attended, representing 42 different nations. We listened to the address of the president and afterwards to the speeches of the representatives of various nations and governments.

"The most eloquent speech was unquestionably that of Edmond Privat, of Geneva, Switzerland. No one can speak more fluently in his own native tongue than Privat speaks in Esperanto. A Roumanian and a Bulgarian delegate also distinguished themselves in fluent Esperanto.

"In the evening, at the City Theatre, we were entertained by the 'Nuremberg Master-Singers' in German.

"After the first business session on Friday was held an 'ovation' before the monument of Albrecht Durer, the most famous painter in Germany. This international assembly placed a large crown upon the monument.

"Saturday morning Esperanto church services were held according to the Protestant, Catholic and Hebrew faiths. Truly I was surprised how well I understood every word. All in all, the congress was excellent and a grand success for our cause."

(The writer of the above letter is a workingman and concludes with this touching sentence):

"If you visit South Germany, be my guest; you will find coarse, black bread but warm hearts."

MALBONA LINGVISTO

Juna longhara muzikisto kuregis en Novjorkan muzikven-dejon, kaj rapidece kriegis al la vendistino, "Mikado libretto."

La fraŭlino atendis kelkajn momentojn, pensante. Tiam ŝi dolce diris, "Me no speaka italiano."

D. W. M. Jenkins.

NOKTURNO

Antaŭ tri aŭ kvar jaroj ni logis en dometo en la kamparo. Unu nokton kiam mi kuſis veka en mia lito, mi aŭdis strangan, neordinaran sonon. Kio povis tio esti? Ĉu ĝi estis ia besto de la arbaro serĉanta sian rabajon, aŭ eble ia nokta birdo vokanta al sia kolego? Mi eklevigis el mia lito kaj iris al la fenestro. Cio estis mallumeco! Neniu stelo brilis en la ĉielo, nek luno!

En la trankvileco mi atendadis kaj aŭskultadis. Post sekundo aŭ du venis sono denove, pli klara, "Huū, ūuū, ūu, ūu."

Tio estis la noktuo!

Sekve malproksimege el la distanco venis la respondo pli malaŭte, "Huū, ūuū, ūu, ūu."

Neniu alia sono! Kaj poste la distanca horloĝo sonis la noktomezan horon.

Adelia D. Frost.

HO, CERTE!

Li.—Mi ege amas la Bonecon, la Verecon, la Senkulpecon, la Belecon.....

Si.—Ci-tio estas iom subita; sed mi pensas ke la patro tuj konsentos.

One touch of Esperanto makes the whole world kin

Now you are going to make a start, which is the best way to begin?

It may be well to find out the Secretary of the local group and begin to attend the meetings.

Esperanto is so simple that you can easily teach yourself. Most of us did that.

Every beginner should have that indispensable helper, the "Edinburgh" Pocket Dictionary. Price \$0.75 and a Grammar, say Kellerman Reed, also \$0.75, with these you will be well equipped for the journey.

Certainly you should join the Esperanto Association of North America, and subscribe to "Amerika Esperantisto."

Membership and Magazine is \$2 a year

Send to the Secretary, E. A. N. A.

507 Pierce Bldg.,

Copley Square

Boston 17, Mass., U. S. A.

Jan Zizka, Komandanto de Husitoj

Por kvincentjara datreveno de lia morto

Kiam finestingiĝis flamoj en Kostnice Constanza, kiuj pereigis vivon de unua batalanto por libereco de konvinko, de Majstro Jan Hus, ne ĉesis BOHEMOJ batali kontraŭ malbonigita tama eklezio. Preskaŭ tuta nacio bohema, el kiu Jan Hus eliris, fariĝis lia sekvento kaj volis, ke la eklezio direktu sin sole per la vorto de Dio, per biblio. Potenca, riĉa kaj voluptema eklezio ne volis obei, ne volis forjeti potencon kaj ne volis reveni al humileco kaj frateco de originala kristana komunumo. Anstataŭ tio la eklezio atakis reformatorojn,—la tutan nacion bohemian ĝi deklaris kiel herezulan kaj proklamis kontraŭ ĝi kruemilitistajn batalojn.

Kruemilitistaj ekspedojoj estis teruregaj armiloj en manoj papaj. Per ili—kaj pli malfrue per inkvizicio—oni subpremis ĉiun movadon reforman. Urbojn kaj tutajn provincojn ili per tio ruinigis! En komenco de XIII-a jarcento ruinigis kruemilitista soldataro, elsendita kontraŭ Albigentoj, la tutan sudan Francion. La sama destino atendis eĉ Bohemion, ĉi tiun malgrandan landon en meza Eŭropo! Sed fariĝis ja tute alie! Frunte de bohema, husita popolo starigis malriĉa bohema landbienulo Jan Zizka el Trocnov. Estante talentplena tiel dire de geniala batalema spirito, arangis kaj elekzercis multegajn vicojn de husita popolo tiel bataleme, ke pli multe ol kvin jarojn li ilin kondukadis de venko al venko! Nomo de Zizka fariĝis konata kaj timema en tută Eŭropo! Zizka estas unu de kelkaj armekomandantoj, kiuj estas neniam superfortigitaj. Se Zizka ne estus havinta prudenton bataleman, estus la bohemojn renkontita la sorte de Albigentoj kaj potenco de Romo plu multe disvastiĝus!

Kiam la 11-an de Oktobro 1424 mortis Zizka glora komandanto de Husitoj, funebris por li husitaj batalantoj kaj ili nomis sin de tiu tempo "Orfoj." Post la morto fariĝis Zizka al simpla popolo bohema personiga heroeco. Eklezio katolika pri li predikis kaj paroladis kiel pri homa besto, kiu ĉion katolikan forbruligadis kaj mortigadis! Historiistoj lin priskribas kiel perfektan militiston, kia li restis eĉ post sia blindigo.

Čekoslovaka nacio, kiu post unu jaro rememoras 500-jaran morton de Zizka, rememorigos al si—kaj kun ĝi certe eĉ la tută justa mondo—grandan personon de Zizka, lian puran karakteron.

Nesuperfortigebla komandanto de Husitoj defendis vorton de Dio. Li estis pia sed ne estis bigotulo! La bigotecon li ripročis

ĉefe al monaĥoj kaj pro tio li persekutis ilin. La vorto estis al li nedifektebla garantiajo, kaj se li ion promesis, li plenumis tion. Li volis havi en Bohemio homojn rektajn, ne hipokritajn. Je gloro li ne sopiris! La historio konas multe da ekzemploj, ke armekomandantoj ekokupis la regadon kaj ke ili fariĝis regantoj. Zizka la samon ne faris, kvankam popolo bohema certe lin kun plezuro kaj amo obeus. Li ne sopiris ankaŭ je riĉeco! Imperiestro Zigmund proponis al Zizka oron kaj regadon en Bohemio se Zizka rezignos je la batalado. Heroo Husita tion kun indigno forrifuzis. Zizka humilijis kaj batalakiris kastelojn, urbojn kaj venkobatis la krucmilitistajn soldatarojn. Li havis okazon por amasigi grandegan kaptajon kaj por riĉigi. Li ne faris tiel, li mortis en plena malriĉeco! Malriĉa restis eĉ lia frato, kaj lian propran onklidon subtenadis komunumo de Praha. Ĉu la historio konas pli grandan ekzemplon de neprofitemeco? Eĉ ne post la plej granda sukceso Zizka ne fieriĝis kaj restis honesta husita frato!

Lia batala scio vekas ĝis hodiaŭ atentecon de la tuta mondo. Li venkis en multaj pli grandaj kaj pli malgrandaj bataloj. Centmilaj soldataroj krucmilitistaj iris kontraŭ lia grupeto kaj estis tute faligitaj. Li humilijis preskaŭ tutan Eŭropon. La tuta Eŭropo obeis la ordonon de papo kaj iris en centmilaj amasoj por humiliigi malgrandan landon bohemian. Sed, Zizka ĝin defendsavis per sia militprudento. Dum batalado li fidis ĉefe je la infanterio, kiun li elekzercis. Li perfektigis la sistemon de vagondifendado kaj sian antaŭenmarŝadon li aranĝis laŭ la karaktero de batalejo.

Bohema nacio vidas en Jan Zizka la heroon, kiu lerte sciis tutan nacion unuigi por defendo kontraŭ subpremantoj. Rememoro je 500-jara datreveno de lia morto apartenos al decide-meco, honesteco kaj neprofiteco de Zizka.

Caslav.—urbo de Husitoj, en kiu Zizka estis enterigita kaj kie estis ankaŭ la 21-an de novembro 1910 liaj ostoj trovitaj,—komencis grandajn preparojn por indece glorigi 500-jaran datrevenon de morto de Zizka. Ĉi tiu glorigo estos vere grandega manifesto de la tuta Ĉekoslovaka popolo!

Korporacio de Zizka en Ĉaslav, Bohemio.
Laŭ la bohema originalo esperantigis Josef Šilhart, vagonarrevizoro de Ĉekoslovakaj fervojoj en Nymburk, Bohemio.

Editor "Amerika Esperantisto."

Dear Sir:

I take pleasure in sending to you a little article touching on the doings of our Esperantist friends in the village of Arden.

Jam delonge la malgranda vilaĝo Arden en la Ŝtato Delaware estis vera Esperantujero. Preskaŭ neniu el la nunaj tieaj loĝantoj neniam aŭdis ion pri la Internacia Lingvo, kaj tre neofte preterpasas vintra sezono sen la kutima, tradicia Esperanta klaso. Ofte oni kondukas klason por la spertuloj krom tiun por la komencantoj.

Dum kelkaj jaroj Arden estis—kaj ankoraŭ estas—la hejmloko de ambaŭ el la Delegitoj de U. E. A. por la apudaj urboj Philadelphia kaj Wilmington, kaj alia Ardenano oficiale reprezentis Delaware, pro elekto de la Ŝtatestro, en la Nurnberga Kongreso.

Je la 14an de Aŭgusto oni havis publikan propagandkunvenon en Arden kun tridekkvin ĉeestantoj. S-roj Henry W. Hetzel kaj Donald Stephens klarigis la movadon, la lingvon kaj precipe Esperantismon kaj la U. E. A. Multe da intereso montriĝis ĉar la vilaĝo enhavas iom da idealista tendenco. Oni tuj organizis klason de dek membroj, kiu celas daŭri la studadon de la lingvo dum la aŭtuno kaj vintro.

Frank S. Henry,
Chairman of Publicity Committee.

La San Franciska "North-Beach" Vesperinstituta Lernintaro postulas je tieula Edukista Komisionaro pri projekto laŭ kio la tieurba studentaro korespondadu kun alilandaj lernantoj. Celo estu restarigi internacian amikecon kaj tiel estigi povecan rimedon eliminonta militojn.

Tiacele la D-ro med. Van Becelaere, Usona Konsulo de la TEKA (Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio), proponis siajn servojn enkondukante la studadon de l' Esperanto.

Amerika Esperantisto

Will you help us to make "Amerika Esperantisto" more widely known? A larger circulation means a better magazine, and a better magazine means larger circulation. We suggest that you get every member of your group to take it regularly. Show it to your friends. See that there is a copy in your public Reading Room every month. In these and other ways which may occur to you, help us to make "Amerika Esperantisto" an outstanding success.

Subscription \$1.00 a year.

"Amerika Esperantisto" 507 Pierce Building
Copley Square, Boston 17, Mass., U. S. A.


Latinamerika Fako

Argentino. Aferoj Esperantaj ŝajnas iomete dormemaj en ĉiu lando, sed nia lingvo tute ne estas morta. En Pringles, nia samideano, Sinjoro Merlotti, Delegito de la U. E. A. propagandas per la lokaj gazetoj kaj baldaŭ li intencas starigi kurson. Bonege—antaŭen!

En Rosario, la dua urbo de la respubliko, samideano C. E. Silburn Gerlach, propagandas per la Rosariaj gazetoj. Tiu-ĉi fervora samideano ankaŭ intencas komencigi kurson ĉe la ingeniera fakultato, kie li estas studento.

Ni volas rememorigi al ĉiuj samideanoj en ĉiuj Amerikaj landoj ke ĉiam estos al ni granda plezuro ricevi raportojn rilate al la progreso de Esperanto en aliaj partoj de la mondo. Do, ne forgesu skribi al via gazeto, la Amerika Esperantisto.

D. W. M. Jenkins.



Recenzoj

“Eklumo en la Abismo,” de Henri Barbusse. Eldonajo de Sennacieca Asocio Tutmonda. Traduko el la franca lingvo de Else.

Al tiuj kiuj interesiĝas pri tutmonda politiko kaj ekonomio oni povas rekomendi la legon de ĉi-tiu bona traduko de “La Lueur dans l’Abime,” kiu, laŭ la antaŭparolo de la aŭtoro, Henri Barbusse, estis tradukata en proksimume ĉiujn vivantajn lingvojn. Kvankam la legontoj sendube ne akceptos ĉiujn la opiniojn esprimatajn en ĉi-tiu 96-paĝa libro, neniu povos dubi ke la verkinto estis instigata de la plej pura altruismo. La libro estas studinda de ĉiu vera esperantisto, kiu kutimiĝas pensi preter la limoj de sia propra vilaĝeto.

La stilo estas sufice bona, kaj, krom la uzado de la multe kontraŭbatalata sufikso “-enda,” la libro estas skribata en Esperanto Zamenhofa.

La preseraroj estas malmultaj; la recenzanto rimarkis nur la jenajn:—

- “Amonaŭ” por “almenaŭ,” paĝo 24, linio 6.
- “ne” por “tio,” paĝo 24, linio 5.
- “modo” por “mondo,” paĝo 32, linio 32.
- “kiun” por “kun kiu,” paĝo 36, linio 3.
- “esas” por “estas,” paĝo 52, linio 18.

D. W. M. Jenkins.

“Natan la Saĝulo,” drama poemo de Gotthold Ephraim Lessing. Traduko el la germana lingvo de Karl Minor, L. K. Eldonita de Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. M. B. H., Berlin kaj Dresden.

Tradukinte “Nathan der Weise” de G. E. Lessing, nia samideano estas farinta grandan benon al la tutmonda esperantistaro, ĉar ĉi-tiu drama poemo estas interesega kaj vere belega. En la antaŭparolo la tradukinto elmontras la principojn de kiuj li estis gvidata en la tradukado de la poemo. Li konkludas per ĉi-tiu vortoj:—

“Kvankam do ‘Natan la Saĝulo’ estas traduko, mi verkis ĝin “kun la celo, ke la leganto havu la impreson, legi Esperantantan poeziecan verkon, kaj oni legu ĝin, konsiderante ĝin ‘unue kiel Esperantan poemon kaj nur duavice kiel tradukitan el alia lingvo klasikan dramon.”

Ne nur estas ĉi-tiu celo plene atingita, sed estas nefacile realizi ke la poemo ne estas originala Esperanta verko.

La tradukinto uzas la sekvantajn notindajn vortojn:—“defterdaro” (arabe por “trezorestro”), “kalma,” “sombesto” (angle,

"sumpter horse"), "delko" (vesto de dervišo), "precipiti al," "kombati," "kozo" (angle, "cause"), "salvi" (angle "to save"), "jamerlonko" (araba vestajo), "prinzo" (titolo de princo, kiu ne estas filo de (la nuna) regnistro). Sinjoro Minor uzas la sufikson "-enda," ĉar li opinias ke, kvankam ĝi ĝis nun (septembro 1921) ne estas jam aprobita, plie kaj plie enradikiĝos en nian lingvon.

Tutkore mi rekomendas "Natan la Saĝulo" al la legantoj de A. E.

Oni ne mencias la prezon.

D. W. M. Jenkins.

"Morgaŭ Matene," Dramo en tri aktoj de Frederiko Karinthy. Tradukita el la hungara lingvo de K. de Kalocsay.

La ĉefa valoro de Esperanto, de la literatura vidpunkto, estas sendube la povo legi la tradukitajn kaj originalajn verkojn de alilandaj aŭtoroj. Kompreneble, anglo povus multe profiti per la legado de la Esperante tradukitaj verkoj de Shakespeare; sed kiom multege pli profitus italo, ekzemple, ne komprenanta la anglan lingvon? Kiom da Amerikaj esperantistoj legas alilandajn esperantajojn?

Unu el la plej bone konataj nomoj de la moderna hungara literaturo estas tio de Frederiko Karinthy, kiu, mi diru pasante, ne nur estas interesata pri Esperanto, sed li ankaŭ ĝin parolas. Li estas skribinta, de tempo al tempo, artikolojn favorajn al nia lingvo en la hungaraj gazetoj, kaj li donis la permeson por Esperanta traduko de ĉiuj siaj verkoj.

"Morgaŭ Matene" estas tre bona kaj interesa dramo, kiu atingis pli ol cent prezentadojn. Ĉi-tiun teatrajon, kiu estis skribata dum du semajnoj en la oka monato de la mondumilito, bonige tradukis Sinjoro K. de Kalocsay. Tiu-ĉi traduko estas tipa ekzemplo de tio kion povas fari sperta esperantisto, kaj mi esperas ke ĝi estos legata de multaj amerikaj samideanoj.

La tradukinto uzas kelkajn novajn vortojn—kredeble nur prove—kaj en la tria akto li lerte reprezentas la slangan paroladon de hungaraj "apaĉoj." La jenajn esprimajojn oni notu: "ekbir-di" (= ekflugi), "forlevi" (= ŝteli), "smiro" (= bato), "ĉiigī" (= alveni). Ĉi tiuj vortoj estas kompreneblaj, sed eble ne ĉiu leganto komprenus la sekvantajn sen la klarigo kiu estas aldona de la tradukinto. "Tabako" (= mono), "guadi" (= fari malbonan ŝercon, fanfaroni), "lufto" (=aero), "d'Hivero" (= vintraĝardeno).

La libro estas eldonata de la Hungara Esperanta Instituto, Budapest, VI. Eotvos-u. 3. Mi tute ne povis trovi ian mencion de la prezo.

D. W. M. Jenkins.

Reviews of a large number of books, including "Spoken Esperanto" by our samideano N. W. Frost are unavoidably held over.

We acknowledge with thanks letters from S-ro A. Corbett, Sidney, Nebraska Robert I. Clegg, Chicago; Louis Poncet, Lyon; Edward S. Payson, Boston; Ferdinand Hirt & Son, Leipzig; C. F. Bardorf, Montreal; W. M. Page, Edinburgh; Wm. J. H. Knappe, Clinton, Iowa; Ellick Maslam, Uniontown, Pa.; and S-ino Alice Wicks, Vancouver, B. C.

Mi frapis kun batego lin,
Kaj tuj ĉiuj laŭdis min—
 Kriegis tri hozanojn.
Pro kio? Estis la fripon'
 Kiu skribiĝis la kanton:
 "Jes, ni ne havas bananojn."

Translated from the Boston Post by Louis Lars.

LA GENTILECO

Aŭtomobilisto unu tagon estis fluganta je tro granda rapideco, kaj rezulte li estis haltigata de policano, al kiu li diris, "Vi estas azeno." Kiam li sin prezentis en la juĝejo, kaj post la pago de dudek perfekte bonaj dolaroj, la juĝo klarigis al li ke ne estas permesata paroli tiamaniere al policano.

"Do, mi ne estas permesata nomi policano "azenon?" li demandis.

"Ne, certe" respondis la juĝisto. "Ne estas laŭleĝe insulti policanon."

"Sed ĉu via moŝto malpermesus ke mi nomu azenon "policano"?"

"Tute ne," diris la juĝisto ridetante, "Se tio iamaniere plaĉus al vi."

La aŭtomobilisto sin turnis al la oficisto kiu lin estis haltiginta. "Bonan tagon, policano," li diris, elirante la juĝejon.

La Legendo pri la Postlasajo de la Maŭro

Rakonto de Washington Irving (daŭrigo)

Tradukita de D-ro Louis Allen, University of Toronto

“Amiko Peregil,” li diris, “ĉi tiu afero devas resti profunda sekreto ĝis kiam ni forportos la tutan trezoron kaj metos ĝin en bonan lokon. Se unu vorteto pri tio ĉi atingos la orelon de la alkaldo, ni estos perditaj!”

“Vi estas prava,” respondis la portisto de akvo, “nenio povas esti pli certa.”

“Amiko Peregil,” diris la Maŭro, “vi estas diskreta homo, kaj mi ne dubas, ke vi povas gardi sekretan; sed vi havas edzinon.”

“Si ne scios eĉ unu vorton pri la afero!” brave respondis la portisto de akvo.

“Sufice,” diris la Maŭro, “mi kalkulas ke via diskreteco kaj via promeso.”

Neniam promeso estis pli kategoria kaj pli sincera sed ho ve! kiu viro povas gardi sekretan de sia edzino? Certe ne tia viro kiel Peregil, kiu estis unu el la plej bonaj kaj sindonemaj edzoj en la mondo. Kiam li alvenis hejmen, li trovis sian edzinon, kiu atendis lin, lamentante en angulo. “Estas bone,” ŝi diris, “ke vi fine revenis, post via nokta vagado! Mi miras pri tio, ke vi ne alkondukis alian Maŭron.” Tiam ŝi ekplorejis kaj komencis rompi la manojn kaj bati al si la bruston. “Ho mi malfeliĉa!” ŝi ekkriis, “kio fariĝis kun mi? Mia domo estas elrabita de advokatoj kaj algūaziloj, kaj mia sentaŭga edzo jam ne alportas panon por sia familio, sed li vagadas tage kaj nokte kun malfidelulaj Maŭroj! Ho miaj infanoj! Miaj malfeliĉaj infanoj! Kio fariĝos kun ni? Ni devos ĉiuj peti almozon en la stratoj!”

La bona Peregil estis tiel kortuŝita de la aflikto de sia edzino, ke li ne povis reteni siajn proprajn larmojn. Lia koro estis tiel plena kiel liaj poſoj kaj li ne povis repremi ĝin. En ŝovinte la manon en la poſon, li eltiris tri aŭ kvar grandajn ormonerojn kaj metis ilin sur ŝiajn genuojn. La malfeliĉa virino malfermis la okulojn kun mirego kaj tute ne povis kompreni la signifon de ĉi tiu ora pluvo. Antaŭ ol ŝi povis sin ekregi, la Galicianeto prenis oran ĉenon kaj komencis skueti ĝin antaŭ ŝiaj okuloj, saltetante de ĝojo, kun rideto, kiu atingis ĝis la oreloj.

“Sankta Virgulino gardu nin!” ekkriis la edzino. “Kion vi faris, Peregil? Ĝu vi fariĝis rabisto kaj mortigisto?”

Apenaŭ ĉi tiu penso eniris la cerbon de la mizera virino ĝi fariĝis por ŝi certeco. Si vidis antaŭ siaj okuloj pendingon kun la kurbkrura Galicianeto pendanta de ĝi; kaj premegita de la terura bildo elvokita de ŝia imago, ŝi falis en histerion.

Kion la malfeliĉa edzo povis fari? La sola rimedo, kiun li havis por trankviligi sian edzinon kaj dispeli la fantaziojn de

śia cerbo, estis rakonti al ŝi la tutan historion pri sia bona fortuno. Tion ĉi li ne faris tamen antaŭ ol li eldevigis de ŝi solenan juron, ke ŝi gardos ĝin kiel plej profundan sekretan.

Priskribi ŝian ĝojon estus neeble. Si ĉirkaŭprenis la kolon de sia edzo kaj preskaŭ sufokis lin per kisoj. "Nu, kara edzino," ekkriis la vireto kun ĝoja entuziasmo, "kion vi diras nun pri la postlasajo de la Maŭro? En la estonteco ne insultu min, se mi helpos malfeliĉan kunhomon."

La bona Galicianeto kuſiĝis sur sia ŝaffela mato kaj dormis tiel bone kvazaŭ li kuſuis sur plej mola lanuga lito. Lia edzino tamen ne dormis. Si elſutis sur la maton la tutan enhavon de liaj poſoj, kaj sidis tie la tutan nokton, kalkulante la arabajn monerojn, provante ĉirkaŭkolojn kaj orelingojn, kaj prezentante al si la figuron, kiun ŝi iam faros, kiam ŝi havos la permeson libere ĝui sian riĉaĵon.

La sekvantan matenon la bona Peregil prenis grandan ormoneron kaj foriris al la butiko de juvelisto en la Zakatino por ĝin vendi, ŝajnigante, ke li ĝin trovis en la ruinoj de la Alhambro. La juvelisto vidis, ke ĝi havas maŭran surskribon kaj estas el plej pura oro; li proponis, tamen, nur trionan parton de ĝia valoro, je tio la portisto de akvo estis tute kontenta. Aĉetinte novajn vestaĵojn kaj diversajn ludilojn por la infanoj, kaj bongustajn mangajojn por la familia tablo, Peregil revenis al sia domo, kie la infanoj ĝoje akceptis lin kaj komencis dancadi ĉirkaŭ li, dum li mem saltetis meze de ili, kvazaŭ li estus la plej feliĉa patro en la mondo.

La edzino de la portisto de akvo tenis sian promeson kun miriga severeco. Dum tuta tago, kaj eĉ dum duono de la sekventa tago, ŝi rondiradis kun mistera mieno, kun la koro tiel plena, ke ĝi preskaŭ krevis, tamen ŝi gardis sian sekretan, kvankam ŝi estis konstante ĉirkaŭita de siaj babilemaj amikinoj. Estis vere, ke ŝi permesis al si iometon da fiereco en sia sintenado; ŝi faris senkulpigajn aludojn pri sia cifona vestaĵo, kaj anoncis sian intencon aĉeti belan novan jupon, riĉe garnitan per ora pasamentaĵo kaj vitroperloj, kaj novan puntan mantilon. Si eĉ aludetis pri la decido de sia edzo forlasi la metion de portisto de akvo, kiu ne tute konvenis al la stato de lia sano. Cetere estis afero preskaŭ decidita, ke la tuta familio iros pasigi la someron en la kamparo, por ke la infanoj povu profiti la aeron de la montaro, ĉar estas ja neeble vivi en la urbo dum tiu varmega sezono.

La najbarinoj interŝangis mirigitajn rigardojn kaj supozis, ke la kompatinda virino perdis la saĝon. Siaj afektemaj manieroj kaj elegantaj pretendoj fariĝis por ŝiaj amikinoj temo por ĝenerala mokado kaj ridado tuj post kiam ŝi turnis al ili la dorson.

(Daŭrigota)

STRIKE WHILE THE IRON IS HOT—A CLASS THEN AND THERE
BOOKS and PROPAGANDA Material of all kinds are on sale at The ESPERANTO OFFICE
Drop us a postcard asking for a catalog
THE ESPERANTO OFFICE, 507 Pierce Building, Copley Square, Boston 17, Mass., Usono

MISERERE (Wagnalls) kaj THAIS (France) Po \$.50.

La ROZUJO ĈIUMILJARA (Wagnalls)
La AKROBATO de Nia Sinjorino
BLANCHE, la Virgulino de Lille (Schubin)
MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo dum la Milito
(Giesy) Po \$.35.

La unuaj eldonajoj tradukitaj de
S-RO EDWARD S. PAYSON
Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko
Aĉeteblaj ĉe la Esperanto Office,
Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

DEZIRAS KORESPONDII

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poštaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

S-ro V. A. Platnikov, Rusujo, Moskvo, Ordinskij Tupik d. 6, Rv. 19, sendas salutojn al siaj malnovaj korespondantoj kaj deziras renovigi korespondadon kun ili. Ankaŭ deziras korespondadi kun Esperantistoj de ĉiuj landoj. Promesas respondi. Li povas interŝangi librojn, gazetojn, jurnalojn, p.k. aŭ leterojn, k.t.p.

S-ro Jan Merta, Forberk 5, Wamberk, Čekoslovakia.

Oklahoma City, Okla. (Usono) Grupo. I.P.K., L. Sin turnu al R. E. Dooley, 527 North Durland.

Chas. Scanlon, University, Alabama (Usono) kolegia studento deziras studentajn korespondojn. 11

Roy Johnson, 1168 W. 24th Street, Los Angeles, Calif., deziras korespondojn en ĉiuj landoj 11

THE WRITER'S MONTHLY
Edited by J. Berg Esenwein

A magazine of real help for those who write. Carolyn Wells says:

"The best magazine of its kind because it is practical."

Single copies 25 cents \$3.00 a year

THE WRITER'S MONTHLY, Dept. A
Springfield, Mass., U. S. A.

ATTENTION! ESPERANTISTS!

The LLANO PUBLICATIONS

record the doings of the Llano Co-operative Colony in Louisiana. This group of co-operators are using Esperanto largely and aim to use it in their every day work. It is probably the only community of its kind. Children are taught Esperanto in the High school course. They are also co-operating in the production and distribution of the necessities of life. They have a beautiful social life in a healthy happy community. Write for literature and ask for a sample copy free.

LLANO CO-OPERATIVE COLONY

Leesville, Louisiana.

SKANDINAVA ESPERANTISTO

Monata internacia gazeto, ĉefe en Esperanto, parte en sveda lingvo. Enhavas artikolojn pri lingvoj, scienco, propagando esperanta, informojn ĉiuspecajn, k. a.

Jarabono: duondolaro

Adm: Skandinava Esperanto-Instituto,
419 Seventh St., Rockford, Illinois,

USONO

ADVERTISE IN ENGLISH — AND IN ESPERANTO

Reklamoj \$20. po paĝo— $\frac{1}{4}$ paĝaj aŭ pli—10 numeroj sen ŝango \$150. Perantoj skribu, pri rabato.

THE PERSON WHO NEGLECTS TO

STUDY ESPERANTO

IS BLIND, DEAF, AND DUMB TO THE
WORLD HE NOW LIVES IN

ESPERANTO HAS THE ENDORSEMENT OF EVERY
REASONABLE INVESTIGATOR

as the one PRACTICAL auxiliary language
Recognized and in use as such since the World War by:

The International Red Cross
The World Union of International Associations
The French and Italian Associations for the Advancement of Science
The French Academy of Sciences
The International Women's Suffrage Alliance
The International Peace Bureau
The International Labor Office
The World Union of Women
The Catholic International League of Youth
The Young Men's Christian Association
The International Bureau of Freemasons
The International Fairs of Leipzig, Frankfort, Lyons, Paris, Basle,
Padua, Lisbon, Barcelona, Bratislau, Bordeaux, Vienna, Reichenburg,
Malmoe, and Helsingfors
The Centennial Exposition of Brazil
The Paris Chamber of Commerce
and dozens of other organizations

UNANIMOUSLY ENDORSED BY LEAGUE OF NATIONS ASSEMBLY
By vote of September 21, 1922

HESITATE NO LONGER
ELEMENTARY and ADVANCED
CLASSES FOR STUDY OF THE LANGUAGE

are now just forming in all the principal cities of
NORTH AMERICA
and courses by correspondence may be arranged for anywhere

(If you lack details as to local courses write today to)
The Central Office of the Esperanto Association of North America
507 Pierce Bldg., Copley Sq., Boston 17, Mass., Hdqrs. for information & supplies